

Eo-Trovaĵo



Eo-Trovaĵo #14

En la modon venas nova sento!
trovita de la kune-teamo en Vieno, aprilo 2007

1/2007

-kune-



PRS - post IS?!

Impressum

Chefredakteurin: Luisa Rund, Layout: Katharina Tanzberger, Korrekturleser deutsch: „Sinonimo“, Korrekturleser Esperanto: Aleksandro Galkin, Versand: Carolin Hötzl, Jan-Christof Hienerwadel, Herstellungsort: Anröchte, Druckerei: Kirchoff Druck-Technik, Bergerstr. 21, 59609 Anröchte, Medieninhaber: Dt. Esperanto-Jugend, Einbecker Str. 36, 10317 Berlin, Auflage: 640 Stück, Verkaufspreis: 2,50€, Das Jahresabo kostet 10€, für Mitglieder der DEJ und AEJ ist der Bezugspreis im Mitgliedsbeitrag enthalten, mehr dazu unter dej-intern. Anzeigenpreise auf Anfrage.

Die /kune/ ist die Verbandszeitschrift der Deutschen Esperanto-Jugend e.V. und der Österreichischen Esperanto-Jugend und erscheint viermal jährlich. Namentlich gekennzeichnete Artikel spiegeln nicht unbedingt die Meinung des Vereins oder der Redaktion wider.

Titelbild: Luisa Rund, kune@esperanto.de

THEMA - PRS - POST IS?!

Filozofo - PRS

06/7

BERICHTE - TREFFEN

kune ĉe IS06/07

04/5

AGO-semajno

08/10

Herzberg - unuaj tagoj de volontulo

24

3/2006-02

kune editorial

POST 10 MINUTOJ KUJ PROGRAMEROT
DEVAS ESTI EN LA TABULO!!



Unua bona Vorsatz:

Luisa: "Also Mädels! Jen 2007....."

1a bona antaŭfrazo: fari kune eĉ pli bona

2a bona antaŭfrazo: ne plu forgesi danki al helpintoj (dankon denove al ĉiuj, kiuj helpis al ni publikigi la artikolon pri "kial kabei", ekz. A.K.!)

3a bona antaŭfrazo: lanĉi la venDEJon (vendAEJo)!

4a bona antaŭfrazo: finfine trovi la perfektan ekvilibron inter kune kaj la reala vivo (laboro/abituro)

5a bona antaŭfrazo: finfine rigardi la filmon "Der Himmel über Berlin" sen endormiĝi!

6a bona antaŭfrazo: pliintensigi kunlaboron kun francoj, aliaj eksterlandanoj kaj la estraro de GEJ

(7a : finfine eltrovi, kion signifas "guter Vorsatz" en Eo)"

Stefa kaj Kathi: "Eble pretigi kune pli tempoakurate, laŭ la limdatoj??"

Ĉiuj tri: "HiHiHaHaHoHoHo! [ridegas]"

inhalt kune

3/2006-03

RUBRIKEN

venonta kune - Varbado

17

Paserino de kolonio

18

Eo-trovaĵo

36

venDEJo

28/29

Adresen/dej-intern

34/35

GEJ -jarĉevkunveno

30-33

SUB18

sub_18 renkontiĝo

22/23

ANKÜNDIGUNGEN

div.anoncoj

25

VERSCHIEDENES

reago al IS/AS

10/11

Initials DC aka Eric Languillat - Eleganta kato

12/13

Kiam Eo estas elektita de neEo-Artistoj

14/15

intervjuo kun Dolchamar

15

Kara Pralinulo, kie vi estas?

16/17

Gratulon al Nastja kaj David-Emil

16

ni perdiĝas en deserto / GEA-Ekzameno

21

revolucaj retejoj

26/27

Eo en Radio

20

KUNE ĈE IS II OOVIIOVII

de Katharina, komiksoj de Luisa, foto de Jessica, kune@esperanto.de

La kune-teamo zorgis pri la murgazeto „Blinda Gardisto“ dum IS 2006/2007 en Wewelsburg

1/2007-04

kune ĉe IS

Ĉi-jare la kune-teamo proponis pretigi murgazeton “Blinda Gardisto” dum IS.

La ideo fari murgazeton dum IS estas sufiĉe malnova, kaj kvankam kune-teamo jam antaŭ kelkaj jaroj komencis pripensi la ideon, multe pli frue jam estis preparata la murgazeto kun la nomo “Blinda Gardisto” ĉe IS. .

Kvankam ni ne sukcesis kune fari murgazeton dum lastaj jaroj, ni ĉiam havis grandajn planojn por tio. Ni volis fari ĉion per programoj kun malfermita fontokodo, verki artikolojn antaŭe, ktp., sed kiel kutime neniu havis tempon por bone pripariĝi.

Retrospektive mi nun pensas, ke tio ne nur tute ne gravis, sed ankaŭ estis la pli bona labor-metodo. Pro tio, ke ne estis iu antaŭpreparo, ni ĉiutage pli kreative kaj freneze faris Blindan Gardiston.

Nia normala tagordo dum 4 (sen la unua) tagoj estis tia:

- (mal)frue vekiĝi
- partopreni prelegon (aŭ ne)
- babili kun homoj
- partopreni prelegon (aŭ ne)
- ne tagmanĝi (manko de tempo)
- fari „redaktionssitzung“ por tiutaga eldono de Blinda Gardisto
- partopreni prelegon (aŭ ne)
- ne vespermanĝi pro laboro pri tiutaga eldono de Blinda Gardisto
- partopreni noktan programon
- trinki (anstataŭas manĝadon, sed bedaŭrinde nur parte)
- babili kun amikoj
- trovi demandojn, intervjuojn por tiutaga eldono

kune dum IS, laborante pri blinda gardisto



la kune-teamo post ISO

- serioze paroli kun Esperantistoj por tiutaga eldono
- malfermi oficejon ie en la ejo (neniam samloke) kaj fari Blindan Gardiston. Tio kutime daŭris ~6 horojn,
- ne dormi dumnokte, sed nur post kiam la tiutaga eldono de Blinda Gardisto estas preta
- kaj denove vekiĝi kaj ekkonscii, ke ni ankoraŭ tute ne scias pri kio temas la tiutaga (sekva) eldono de BG.

Ĉu diabla cirklo? Verŝajne.

Ni havis kelkajn “kutimaj suspektitoj”n, kiuj preskaŭ ĉiutage helpis, kaj aliajn, kiuj unufoje aŭ kelkfoje verkis artikolojn aŭ helpis alimaniere. Ambaŭ estis bonega helpo al ni.

Ni neniam malfermis oficejon en propra ĉambro, ĉar ni tre frue eklernis, ke estas tre grave por ni havi interrilaton kun preterpasantoj. Ni neniam antaŭskribis kie estas

nia oficejo, sed tamen ĉiuj trovadis nin. Ĉu oficejo en koridoro malantaŭ trinkejo, ĉe sur ŝtuparo aŭ en iu angulo kun sid-ebleco kaj elektra ŝtopilingo. Multe estis decidite laŭ ŝanco ĉar ni babilis kun iu kiu pasis kaj sidiĝis en nia oficejo. Malavantaĝo de tio estis ke IS-partoprenantoj, kiuj loĝis en ĉambroj proksime al nia oficejo ofte ne nur ne povis dormi pro ronkado en la ĉambro, sed ĉar ni ekstere – kutime tre gajaj kaj kun multege da ridoj – laboris pri BG ĝis la nokto-nokto-fin’. Mistero restas ke preskaŭ neniu plendis pri tio – eble

kune ĉe IS


ĉar ni tamen ne estis tiel laŭte kiel ekz. nokta koncerto aŭ trinkemuloj en trinkejo.

Laŭ mi – kaj espereble ankaŭ la aliaj pp-oj de IS – blinda gardisto estis grava parto de IS kaj mi ege ĝojas ke ni kune, kune kun la pp-oj de IS sukcesis fari ĝin tiel bone.

**MULTAN DANKON AL ĈIUJ!
SOLE? NE, KUNE!
VIA KUNE-TEAMO**



1/2007-05



FILOZOFA DEMANDO - POSTRENKONTIĜA SINDROMO

ĈU EBLAS TRANSPRENI LA ETOSON DE
ESPERANTIO AL LA REALA MONDO?

1/2007-06

pr. filozofa

La post-esperanto-renkontiĝa sindromo estas socipsike saniga reago al la universalaj mankoj de nia ĉiutaga ĉirkaŭaĵo. Ni ĉiuj sopiras pri paradizaj lokoj. Sed se ni iam travivis kontentigan situacion ni volas tion denove rehavi. Tia estas la sopiro pri amo, ĉar iam ni spertis ĝin, eĉ se ni ne scias kial, kaj ne povas ĝin difini. Se ni elfalas, aŭ estas elĵetataj el la kontentigaj situacioj, ni sentas frustrigon, malfeliĉon, eĉ malsanon. Ni denove volas reen tien, kie ni estis kontentaj, feliĉaj, tutecaj, t.e. (psike) sanaj.

Tiel efikas profundaj psikaj rilatoj en nia subkonscio, kie kolektiĝas la pozitivaj spertoj necesaj por homa travivado, jam ekde la pasinteco de niaj prauloj. Sano estas tuteco de korpo, animo kaj spirito. Pro tio, pli tutecaj estas la spertoj, kiuj kaŭzis tiun senton, kiu povas esti malsame profunda kaj daŭra (Ekzistas lingvoj, en kiuj la sama vorto esprimas kaj la tutecon kaj la sanecon.)

Tiun senton de tuteco provas doni ankaŭ religioj. Ĉiu religio volas kapti la tutecon kaj ebligi la anim-trankvilecon por siaj kredantoj. La problemo videblas nur tiam, kiam la tuteco estas kontraŭstarigita al la realeco. La sopiro pri iam travivata feliĉa kuneco en ŝajna tuteco stimulas al la konservo de tiu stato kaj al la bremsado de novaj spertoj. Tiu psika mekanismo efikas en ĉiu pli-malpli kohera grupo, estu tiu iu religio, ŝtato, nacio, piedpilka klubo, aŭ grupo de ludkameradoj el infaneco. Post konsciiĝo pri tiuj ŝanĝoj, venas matura akcepto de la evoluo kaj eĉ pli granda unueco. Kiam la sento de feliĉo reveliĝas en iu tute nekohera grupo de ĝis tiam ne konataj elementoj, evoluo atingas sian pinton. Tiam la baza kontentiga sperto, kolektita en malgrandaj grupoj, disvolviĝas al la mondskala homaraneco. Tiuj procezoj de por la homa psiko ĝenerale validaj rilatoj kaj ligiteco estas facile kompari kun grupaj eventoj, kiuj okazas dum esperanto-kunvenoj. Sperto pri

ili povus esti profunde decida por spirite kaj anime tuŝita persono en ties plua vivo. Verdire, preskaŭ ne estas imagebla iu alia grupa renkontiĝo kie estus pli plenumitaj la kriterioj de tuteco, t.e. pli granda kultura diverseco, kiuj efikas senpere kaj libere en la sinteno kaj ago el la subkonscio de la partoprenantoj, ol en Esperantio. La etoso de Esperantio efike tuŝas ĉiun partoprenanton, kelkajn eble nur iomete, sed ĉiu havas la senton de "peza koro" dum adiaŭo kaj iu forto plu retiras ŝin aŭ lin reen al la grupo.

Tiel efikas sociopsikologie konataj grup-dinamikaj procezoj de sentoreagoj, kiuj estas observeblaj dum ĉiu sukcesa grupkunveno, kiuj krome havas terapian influon al la sinteno de unuopuloj en la grupo. Se tio spertebblas en Esperantio kun personoj el tre diversaj kultursferoj, eĉ pli profundaj psikaj ŝanĝoj eblas, ĉar tie estas konsiderata la plej vasta diverseco kaj profundeco de sentoj de la partoprenantoj. Pro tio Esperanto-kunvenoj donas unikajn spertojn.

Tie efikas ankaŭ la ĝeneralaj grupdinamikaj procezoj, kiel en ĉiu alia celdirektita grupo. Sed aparte oni pritraktu la ecojn, kiuj estas ĉi tie unikaj, ĉar pere de la principo de konscia evoluo kaj maturiĝo ĝis pli granda tuteco, t.e. ĝis vere kontentiga sento en la mondo, tiuj grupoj havas pli grandan ŝancon ol ĉiu alia celorientite limigita grupo. Se tie eblas atingi veran kunsenton inter la homoj el tute diversaj partoj de la mondo, tiam vasteco kaj profundeco kondukas al la efiko tiom intensa, ke ĝi povas daŭri dum la tuta vivo de iu individuo. Memkompreneble,

la elĵeto el tiu mallonge, sed reale travivata konfideco post la fino de la kunveno elvokas subjektivajn sentojn; kiel perfortan detruon de iu denove atingita origina kuneco kun la sento de kora sopiro pri reveno al la harmonia amikeco, ŝirmiteco kaj paco. Tiu sento de elĵeto ofte manifestiĝas forme de sindromoj. Sed tiuj sindromoj

1/2007-07

pr. filozofa

en tiu kazo montriĝas en sia pluevoluo pli pozitivaj, t.e. sanigaj kaj nur laŭ unua rigardo negativaj. Postrenkontiĝa sindromo de Esperanto-kunvenoj rivelas simptomojn de inicaj socipsikaj saniĝprocezoj, de sintendeficitito al la tutmondeco. (Tiuj unuaj reagoj de la malkonsento en la komenco estas ĝenerale observeblaj en preskaŭ ĉiu saniĝproceso post terapio de la malsanoj.)

Tiu sindromo estas la pruvo, ke Esperanto havas socipsike sanigan efikon al homoj ĉe kiuj ĝi elvokas subkonsciajn sentojn. Do, grupa agado dum Esperanto-kunvenoj trejnigas kaj sanigas la internacian sintenon.

Cartolina postale
Briefkaart
AMIKE,
VIA AMANDO



AGO-SEMAJNO- NOVJARE EN POLLANDO

1/2007-08

kune AGO

de Łukasz ŻEBROWSKI, lukiz@pej.pl, foto de http://www.republika.pl/viavento/raporto/0612_as.htm

Jam la kvinan fojon sub la nomo de Ago-Semajno okazis junulara novjara aranĝo en Pollando. Partoprenis ĝin rekorda kaj, por esti sincera, surpriziga eĉ por la organizantoj, kvanto da homoj. Entute venis 187 personoj el 24 landoj. Plej multnobre el Ukrainio, Pollando kaj Rusio. Jen bildo de - kaj pli pri AS vi povas legi/rigardi/aŭskulti sur sur www.viavento.org aŭ www.as.pej.pl.

La aranĝon organizis la Esperanto-klubo "Varsovia Vento" kaj Pola Esperanto-Junularo kun granda helpo de loka esperantistaro. La urbo Nowy Sącz, ĉirkaŭita de montaro Beskidy, troviĝas sude de Pollando, proksime al Slovakio. Partoprenantoj de AS povis admiri la regionan kulturon dum busaj ekskursoj, laŭ la valo de la rivero Poprad kaj al Stary Sącz. Eblis ekkoni la ĉirkaŭaĵon pere de la ĉevalaj ĉaroj dum plena je lokaj manĝaĵoj akceptado en vilaĝa agrikulturejo, gustumi la tipan por la regiono medon kaj famajn mineralajn akvojn el la kuracurbo Krynica. Dum unu el vesperoj

La novjara festo ĉiam estis grava afero por mi. Bedaŭrinde neniam antaŭe mi havis eblecon bonveningi novan jaron dum iu esperanta aranĝo. Nun, kiam mi scias kiel estas, mi eĉ pli bedaŭras kaj certas ke ĉiu estonta novjara festo estos pasigita en Esperanta etoso. Ago-Semajno estis ĉio, kion mi atendis, kaj eĉ pli. Sep tagoj de senĉesa bona humoro, ridado, amikumado, ekskursoj kaj bonkvalitaj prelegoj. La regiono de la suda Pollando estas same belega kaj interesa, kiel mi rememoras pri la Zakopana IJK, kaj dekorita per vintraj, glaciaj ornamaĵoj, kaj eĉ pli bela! AS por mi, kaj certe por multaj aliaj, estis ebleco renkontiĝi kun multaj geamikoj, alvenintaj el foraj landoj. Kiel organizantoj promesis jam antaŭe, la etoso estis simple neforgesebla. Estas ankoraŭ januaro kaj la tuta jaro estas antaŭ ni, sed ni jam bone scias, ke la tempo nekredeble rapide pasas, kaj en la koncerna momento ni ĉiuj retroviĝos en Pollando, ĝuantaj kaj bonevenantaj ankoraŭ unun novan jaron. Vildana DELAIĆ, Bosnio kaj Hercegovino
La prezidantino de LKK de 62-a IJK



semajno kune

1/2007-09

okazis prezentado de popola muziko, instruado de lokaj dancoj kaj gustumado de lokaj specialaĵoj. Abunda programo pri la regiono okazis dank' al la patronoj de AS: Vicmarŝalo de Malgrandpolia Vojevodio s-ro Andrzej Romanek, starosto de Nowy Sącz distrikto s-ro Jan Golonka kaj la prezidento de la urbo s-ro Ryszard Nowak.

Enkadre de la taga programo okazis kelkaj kursoj, inter aliaj ankaŭ pri meditado, ventro-danco, Esperanto, tokipono kaj pola lingvo. Ne mankis ankaŭ pli distraj programeroj kiel ukrainaj kantoj, prezentado de Krimeo aŭ prelego pri vegetarismo. Sed ja estas AGO-semajno, do organizitaj estis diversaj prezentadoj, trejnadoj kaj seminarioj. Dum la tuta semajno daŭris seminario por Esperanto-instruistoj "Gvidu la flugilojn", preparita de ILEI kaj E@I. Krome E@I prezentis sian ĝisnunan agadon kaj ideojn por estonteco. Dum trejnado pri projekt-gvidado oni povis ekscii pri mastrumado de diversaj projektoj, ekzemple pri preparado de IJK kaj pri la nova Programo Junularo. Alia trejnado temis pri manlibro pri Vikipedio, kiu estis kreita dank' al kunlaboro de FLEJA kaj PEJ per TEJO-projekto "Freŝa Vento".

Nokte funkciis diskejo, filmejo preparita de Marek Blahuš kaj "Orienta korto", fare de Katarina Volkova, kiu estis kvazaŭ ĉin-stila gufujo. En trinkejo (aŭ ie ajn ;) muzikumis inter aliaj Kim Henriksen de "Hotel Desperado", francaj gitaristo Tifen Rabineau kaj akordionisto Benoit Fonty. Krom ĉi tiu muzika trinkej-koridora etoso oni ludis "Homlupojn" gvidatajn de Irina Gonĉarova aŭ festis kun

ĉiam drinkemaj kaj kantemaj katalunoj. Kio ege plaĉis al ĉiuj, estis ĉiam funkcia bufedo. Al mi ĉiam dum Esperanto-aranĝoj mankis "noktomanĝoj" kaj dum AS la problemoj estis solvita.

La plej grava dum la tuta semajno estis kompreneble la silvestra balo. Gvidis ĝin la plej fama DĴ en Esperantio - Roĝer Borĝes, kiu per tiuj vortoj priskribis la aranĝon: "Estis belega festo, la plej varma novjara festo iam ajn en Esperantio!"

Kaj kio do post ĉi-jara, tiom sukcesa Ago-Semajno? Certe ne ŝanĝiĝos mojosa kaj libera

Mez- kaj orienteŭropeca etosejo kie ĈIO EBLAS! Vere, ĉio, kio fizike eblas, estas ebligita de la organiza teamo, kiu povus diri: "nu, via propono estas iom stranga, neniam oni faras tion dum aranĝo, kaj estos plia laboro". Anstataŭ tio, la respondo estis "Jes, kia bona ideo! Ĉu vi helpus prizorgi tion? Do bone!". Tifen RABINEAU, Francio

karaktero de la aranĝo. Daŭre ĝi estos ne multekosta, por ke ĉiuj havu eblecon partopreni. Certe okazos en meza Eŭropo, ĉar ja proksimas kaj por okcidentanoj kaj por orientanoj. Oni planas, ke ekde 2008 AS komencos vojaĝi tra la landoj de la regiono kaj ĉiun duan jaron okazos ekster Pollando. Unue estos Slovakio.

Kio poste – Ĉeĥio, Litovio? Ni vidos :)

Malfacilas priskribi ion nepriskribeblan, do mi rekomendas al vi aŭskulti la 13-an radio-elsendon de Varsovia Vento

Podkasto. Ĝi jam haveblas ĉe www.viavento.org.

Baldaŭ aperos ankaŭ filmoj pri AS, do de tempo al tempo kontrolu la paĝaron www.as.pej.pl.

Kaj ĝis revido dum la AS venontjare!

faktojn: Kompreneble la AS estas konkurenco kaj ĝi ankaŭ estas intencita tiel. Aliokaze ne ekzistus kialo okazigi ĝin samtempe kaj privarbi ĝin vaste. Se la celgrupo de la AS estus ĉefe homoj el orienta Eŭropo, kial oni metas sur la aliĝilojn rekomendon de Esperanto-Junularo el okcidenta Eŭropo? Ke homoj pripensas, kiun el la du aranĝoj partopreni, estas la decida indiko, kiu montras la konkurencon situation.

Laŭdire vizoproblemoj necesigas apartajn renkontiĝojn en okcidenta kaj orienta Eŭropo, 17 jarojn post la falo de la fera kurteno. Estas serioze, konscii pri tiuj problemoj, sed estas ridinde, simple akcepti ilin. Rezignado ne estis kaj ne iĝu la oficiala politiko de la Germana Esperanto-Junularo. En la 1990aj jaroj, kiam ĝenis similaj problemoj, GEJ sukcesis rimarkeble altigi la kvanton de Orienteŭropanoj ĉe la IS. Preterpasi tiun obstaklon do ne estas bela revo.

Spite al la lamentado pri tro altaj kostoj kompare al Orienteŭropaj landoj (tion ni ja konas de politikistoj kiel argumento por kaj kontraŭ ĉio), la IS estas tre atraktiva renkontiĝo, ĝuste ĉar ĝi okazas en Germanio. Esperanto-aranĝo en la t.n. "ora okcidento" ofertas raran eblon al Orienteŭropanoj, vojaĝi al tiu parto de Eŭropo.

GEJ ne povas simple atendi kaj vidi, kiel la aferoj evoluas. Avertan ekzemplon donas la Itala Esperanto-Junularo, kiu dum jaroj pasive rigardis, kiel la tradicie mezgranda Internacia Junulara Festivalo malkreskis ĝis preskaŭa sensignifeco (50 partoprenantoj en 2006). Feliĉe la reagoj de la IS-organizantoj al kritiko kaj proponoj

1/2007-10

reago al IS/AS

REAGO AL -ISO KAJ ASO-

SALUTON!

Leginte la pasintan kune-numeron, mi sentis la neceson verki artikolon kun kontraŭa opinio.

Kore salutas

GUNNAR

djknar@yahoo.com

**LA IS PLI VALORAS OL LA AS!
REAGE AL IS KAJ AS - ĈU
KONKURENCO,
KUNE IVIIIOOVI -**

En sia artikolo pri la IS kaj la AS, Felix Zesch kvazaŭ neŭtrale prezentas la ekziston de du dum-silvestraj aranĝoj por junuloj. Li silentas tamen pri la fakto, ke li mem forte influis tiun situation: Lia agado por Internacia Seminario "nur por junuloj", i.a. tra la klopodo enkonduki maksimuman IS-aĝolimon de 35 jaroj, kreskigis en multaj regulaj IS-vizitantoj la sen-

ton, ke ili ne plu estas bonvenaj. Oni ne bezonas ekonomikan analizon por kompreni, ke tiel ekestas bazo por alia aranĝo kaj ke la partoprenantaro de la IS ŝrumpas. Kurioze tamen, ke Felix iris al la AS. Kial la mezaĝuloj tie ne ĝenas lin, se ili ne estis elteneblaj por li ĉe la IS? Ambaŭ renkontiĝoj ja estas organizitaj de Esperanto-Junularoj.

Felix provas montri la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de la AS kaj la IS kaj konkludas, ke ili ambaŭ ekzistu, sen doni iun preferon al unu el ili. Tia indiferenteco decas por individuo (dubinde tamen, ĉu tio okazu en GEJ-membrogazeto), sed la resumo kaj celo por GEJ devas esti tute aliaj. Signali, ke la AS laŭ la oficiala vidpunkto de GEJ estas samranga, egala al la IS, estus vangofrapo por ĉiu aktivulo, kiu organizas la Internacian Seminarion.

Ŝajne Felix kaj la ĉefa organizanto de la AS nepre volas vivteni iun harmonion, deklarante, ke la AS kaj la IS ne estas (rekte) konkurencaj. Tio ne povas kaŝi la

reago al IS/AS

ne montras tiun "tute ne gravas"-sintendon.

La Germana Esperanto-Junularo certe ne restos neŭtrala rilate al la bonfarto de sia plej grava aranĝo. La Internacia Seminario servas kiel ĉefa fonto por akiri novajn aktivulojn. Helpe ĉe la IS-organizado ofte estas la unua paŝo al longjara aktiveco. La kvalito kaj grandeco de la IS esence influas la sorton de la asocio - tial mi des pli agnoskas la laboron de KKRen, la organiza teamo de la IS.

1/2007-11

INITIALS DC - AKA- ERIC LANGUILLAT -

ELEGANTA KATO

1/2007-12

initials DC

informoj de Zeb, retposhto@kirf.de,
teksto de Luisa, kune@esperanto.
de, foto de Eric de www.initialsdc.
net/ kaj fotoj de fanclub kaj EL-pano
el murgazeto „blinda gardisto“

LI FUMAS CION, KIUN LI
TROVAS, KAJ RUĜAN VINON
LI TRINKAS GRANDKVANTE.
CI-RILATE NE GRAVAS LA
KVALITO AŬ MARKO, SED
LA EKSTERA ASPEKTO, LA
ELRADIADO. PRI KIU TIUJ
PRODUKTOJ PROVIZAS
LIN.

Temas pri Eric Languillat, kies koncerton kun kantoj kaj memproduktitaj filmetoj vi povis sperti dum IS. Tien li venis ĉar li ne havis ion pli bonan por fari – almenaŭ li pretendas tion. Kiel ni scias el fidindaj fontoj, la vera kialo estis tio, ke li serĉas koramikinon. La sopiron pri virinoj li esprimas per siaj artaĵoj, tiuj diaj vivajoj estas la temo de preskaŭ ĉiuj liaj kantoj. Ĉu la serĉo estis fruktodona, tion ni ne scias.... Do, jen eta portreto por ĉiuj aspirantinoj (kaj viraspirantoj, sed ni diras al vi – la ŝancoj malgrandas): Kompreneble ni respektas la privatsferon de niaj intervjuatoj, ni do ne scias en kiu tago kaj kiu jaro li naskiĝis. Sed estis la dua kaj duono nokte, se vi fidas al tiaj horoskopoj, jen valora informo por vi. La loko estis Sens, en la mezo de Francio/nenio. En la aĝo de 18 jaroj li elloĝiĝis el la familia hejmo kaj baldaŭ translokiĝis el la vilaĝeca Sens al Germanio. La lingvon li ja ĉiuokaze estis lerninta en la lernejo (do, por io ĝi ja devas esti

utila...) kaj en Frankfurto li trovis sian rev-laboron: Ekde 2000 li analizas falsajn monbiletojn per mikroskopo ĉe Eŭropa Banko. Tiu laboro okupas lin ekde la 9a ĝis la 18a horo sed poste la mondo de lia arta kreado vigliĝas: li aŭskultas popmuzikon por inspiro, poste produktas muzikon kaj filmojn. Krome, li pasigas liberan tempon okupiĝante pri literaturo kaj matematiko aŭ iras al sia plej ŝatata klubo en Frankfurto, “Klub Keller”, kie oni ludas rok-, pop- kaj elektro-muzikon.

Kaj ankoraŭ unu plian hobion li havas, li estas viro fikse staranta en la vivo – studinte paperfabrikadon kaj printoteknikojn li diras, ke unu el liaj plej ŝatataj okupoj estas “mem produkti falsan monon”. Pro tiom da hobiaj li ofte restas veka tro longe, sed tamen dume ne havas problemojn pri vidado. Lia plej ŝatata koloro estas la roza, kiu tre belaspektas sur la fono de liaj verdaj okuloj kaj brunaj haroj. Sed dum IS ni vidis lin kun ĉielark-kolora brakhorloĝbendo.... (vivaspirantoj, eble jen la ŝanco?) Krome, li portis ĉirkaŭ la brako braceleton kun gravuraĵo “Eric”, donaco de lia avino al lia 13a naskiĝtago.

Traborajojn li ne havas, nek tatuon. Sed se li havus tatuon, ĝi troviĝus sur la ŝultro kaj estus kato – ĉar ĝi reprezentas sendependecon. Se vi do volas fari valentintag-donacon al li, estu ornamaĵo kun kata bildo – ekzemple sur “boxershorts”, kiuj estas lia preferata speco de subpantalonoj. Tiujn aĉetu en la



initials DC

1/2007-13

grandeco M, se vi preferas ion pli kosta – lia ŝugrandeco estas 42. Kaj kio estas lia plej ŝatata manĝaĵo? Fromaĝo, li respondas, speciale sur pico. Ho, la plej gravan mi forgesis skribi – Esperanton li lernis en 2000, renkontis ĝin hazarde en la reto. (Tion li pensas, sed ni scias, ke estis sorto...)



KIAM ESPERANTO ESTAS ELEKTITA DE NESPERANTAJ ARTISTOJ

stilo ludata de la moviĝemaj kaj energiaj Phil Roth (gitaro), Aaron Cianek (Basogitaro) kaj Loe Jacobs (drumo) kiuj ene de nur unu jaro famiĝis en Michigan, kaj nun pretas konkeri la mondon... Tial Esperantos eldonis sian albumon, produktitan de la Bostona produktisto Richard Marr por la eldonejo Red Car Records.

la ludado en tiu disko ne estas seniluziiga kaj certe meritas atentan aŭskultadon. <http://tinyurl.com/3x9kjl>

Nu, se vi havas paciencon kaj tempon por traserĉi dum krosado en interreto, vi tiam povos trovi diversajn artistojn aŭ bandojn kies nomoj estas Esperanto aŭ kiuj titolis unu el siajn albumojn Esperanto kiel ekzemple faris: Kabah (popbando) el Meksikio, Rick Braun (ĵaza trumpetisto) el Usono, Lalo Schifrin (ĵazo) el Usono, Shadofax (ĵazfuzio/novepoko) el Usono, Elektrik Music (elektronika bando) starigita de Bartos el Eks-Kraftverk el Germanio, Freundeskreis (hiphopa bando el Germanio), Viper (poprokbando el Japanio), Ryuicky Sakamoto (elektronika poproka bando el Italio/Japanio), Rosario di bella, Paolino Dallaporta (ĵazo). (jam aperis prezentoj kaj artikoloj pri kelkaj el tiuj artistoj kaj albumoj en diversaj numeroj de Rok-gazet').

Ŝajne Esperanto estas inspiriga kaj pro diversaj kialoj scie aŭ nescie, vole aŭ nevole uzas aŭ misuzas la vorton Esperanto. Sed ĉu tiu nomo ja ne estas universala posedaĵo? Kaj Muziko ja estas universala, por ne diri universa... Ĉu muziko kaj esperanto ne estas la plej trafetaŭgaj por tia universaleco.....?

Plukis por vi, Flo!

Por scii pli pri tio artistoj serĉu ĉe amazon pri „Esperanto“ sub la muziko rubriko aŭ spektu ĉi tien: viperviper.com/multimedia.htm www.lyrics.de/tabs/viper/18a_viper.html

INTERVJUO KUN DOLCHAMAR

el blinda gardisto 06/07 de Rolf Fantom,
rolffantom@yahoo.co.uk

Ni volis intervui la faman rokbondon „Dolchamar“, sed jam antaŭ la koncerto ili tro ebris por povi paroli. Pro tio

intervjuo...ne

ni prezentas tie ĉi niajn ideojn pri kiel okazintus intervjuo kun Patrik, la ĉefebriulo de Dolchamar, se ni sukcesintus lin intervui.

Murgazeto: Kiam venos la Finna Venko?

Patrik: Jes, ja, interese, mhm.....

Murgazeto: Kiom ofte vi ludas en esperanto eventoj?

Patrik: Nu, fakte... jes..... kelkajn fojojn, eble.

Murgazeto: Ĉu vi trovas ke esperantistoj estas bonaj koncertopartoprenantoj?

Patrik: Aha, aha, jes, povas esti. Ĉu?

Murgazeto: Kion vi pensas pri VVĈP?

Patrik: Hmmm, kia koloro... mmmmm uhu.

Murgazeto: Ĉu vi trovas ke alkoholo helpas al via voĉo?

Patrik: mmmmm...mmm-MMMM M

Murgazeto: De kie venas la inspiro por viaj kantoj?

Patrik: Nu, ja, aha..... hmm..... povus esti..... interesa demando, jes,.. jes....

Murgazeto: Patrik, multajn dankojn

Patrik: Fakte, ĉu ne vi volas demandi kelkajn pliajn demandojn, ĉar mi pensas ke mi havas ankoraŭ multon diri....?

Murgazeto: Hmmm

1/2007-14

Eo kaj artistoj

de Floréal Martorell, eurokka.club-internet.fr, foto de www.theesperantos.com

Estas mirige ke en Usono (sed ne nur) artistoj kaj bandoj elektas la nomon Esperanto ĉu kiel titolon de siaj albumoj, ĉu eĉ kiel nomon de la bando mem, kvankam ili ne apartenas al movado, nek parolas Esperanton, ĉu temas pri modo?

EBLE IAM ILI TAMEN AKTIVOS POR ESPERANTO....?

Guste “Esperantos” estas juna roka triopo el Bay City en Michigan. Vere fajriga, vigla kaj trafa garaĝroka

La bando memorigas al ni la fierajn kaj ardajn nervojn de la legendara bando Stooges, en ties tekstoj riveliĝas la intelekto de Kinks kaj de la rifoj (Riffs), ensorĉitaj de la muzikista generacio, kiu estis forte influita de punko. La Bona Roko kiu komencis de bluso kaj kiu ne timas malpurigi, nun revenas kun Esperantos...


Atendante por vidi ilin sur scenejo vi jam povas gustumi ilin ĉe www.theesperantos.com

Alia usona bando prenis kiel originalan nomon Esperanto.

La bando konsistas el du famaj nomoj de la metal/hardkora scenejo: Steve Micciche (gitaro) de “Every Time I Die” kaj Jesse Muscato (Drumo) de “Kid Gorgeous” kaj de du membroj de la disiĝinta punkbando The Budgets, Steve Riter (basgitaro) kaj Ryan Caprio (kanto).

Oni povus atendi, ke la metala kulturo de la du famuloj havus influojn al ilia muziko, sed la unua produktaĵo de Esperanto surbendigita en Novjorko ĉe Watchmen studio (6-titola albumo titolita “Play This Anywhere” kaj aperinta ĉe la eldonejo Uprising) mirige naskis stilon pop-punkan: simplan sed energian.

Kun tiaj muzikistoj, kvalito de



Kara pralinulo, kie vi estas?

Dum la IS mi havis la honoron esti invitata al pralina festo en ekskluziva rondo. La festo estas

1/2007-16

kune pralulino

malnova tradicio kun de IS al IS pludonataj ritoj kaj reguloj. La ritualo estas tia, ke oni ricevas de la granda pralinisto unu el la

ĉokoladaĵoj, priflaras ĝin zorgeme kaj diskutas pri ĝiaj ingredientoj kaj la kvalito antaŭ ol oni enbuŝigas ĝin kaj ĝuas la guston. Kompreneble mi, kiel komencanto, faris multajn erarojn – mankis al mi pacienco kaj mi bezonis tempon por alkutimiĝi al la situacio. Sed, ho, kio okazis... baldaŭ mi tute ne plu povis koncentriĝi al la pralinoj... estis tiu knabo tie, mi jam vidis lin antaŭe dum ISO, sed neniam kuraĝis alproksimiĝi – vi ja konas la senton... kaj nun li subite estis apud mi, tuŝebla, en la sama ĉambro! Lia rideto estis pli dolĉa ol ĉiuj perzipanoj kaj marzipanoj, kiujn mi konas, lia nuko pli bonodoris ol piprokuko, la okuloj estis pli profundaj ol likor-ĉokoladaĵo kaj lian voĉon aŭskulti

estis pli ebriige ol gustumi la plej luksan merci-pralineton. La tutan tempon miaj okuloj restis nur sur li, la aliaj pralinogustumantoj mallaŭdis min kaj mi hontis, speciale ĉar li montriĝis tiom sperta kaj saĝa pri la delikataj manĝaĵoj, diversaj specoj kaj produktoj eĉ. Tiun tagon mi ne iris al la nokta programo, mi restis en mia ĉambro kaj ekkonsciis, ke mi terure enamiĝis. Ho, kaj nun IS estas pasinteco kaj mi scias nek kie li estas nek ĉu mi iam revidos lin. Nenion alian mi deziras pli ol senti lian kison degeli sur miaj lipoj kiel la nugato dum tiu delikata nokto... Mi havas ventrojukojn pro amo, ne povas koncentriĝi pri io-ajn, daŭre forgesas la akuzativo, miaj amikoj

enuas ĉar mi daŭre parolas nur pri pralinoj kaj ĉiun tagon mi iĝas pli kaj pli dika ĉar mi manĝas nur pralinojn... ili rememorigas min pri li. Ĉu vi povas helpi al mi? Kiu konas mian dolĉulon, estu li ĉino aŭ afrikano, aŭ eĉ franco – sen li mi ne volas vivi plu.

De L.

Se vi povas helpi al L., se vi scias ion pri tiu mistera "pralinulo"- skribu al kune@esperanto.de

venonta kune

1/2007-17

Ni elkore gratulas al Nastja kaj David-Emil, kiuj iĝis gepatroj de belega knabino Ella!

tio foto de, kaj por pli aktualaj fotoj; picasaweb. google.com/ella. kozhevnikovawickstroem



Kiel plej efike varbi por esperanto? skribu al ni vian strategion en unu ĝis du frazoj kaj ĝi aperos en nia onta eldono!



LA PASERINO DE KOLONJO

Hodiaŭ: Biciklado tra la okuloj de psikologo
Alaaf de super la tegmentoj de Kolonjo, Esperantujo!

Mi nomiĝas Alica, prononcate "Alisa", kaj estas granda ĝojo por mi de bonvenigi vin al la nova kolumno de KUNE: "La Paserino de Kolonjo". Ĉi tie mi volas rakonti pri mia vivo en la mia studurbo: Kolonjo.

Nur antaŭ nelonge mi estis ankoraŭ atendanta informon pri mia studo: Ĉu mi rajtos studi psikologion? Ĉu mi

1/2007-18

kune paserino

frenozos se ne? – Eble vi scias, ke ricevi studlokon por la fako psikologio ege malfacilas, ĉar ĉi-jare la kvanto de personoj, kiuj emas studi psikologion, estis trioble pli alta ol tiu de studlokoj.

Mi sentis min tiel desperita, ke somere mi rapide lernis la nederlandan. Tie la averaĝa noto de abituro ne gravas, nur la entuta kvanto de tiuj, kiuj volus studi. Tiu sistemo nomiĝas "numerus fixus", kontraste al "numerus clausus" en Germanio.

Nu, finfine venis bona novaĵo, ke mi ja ricevus studlokon en Germanio, ĝuste tiel, kiel mi deziris. Do, krom ĉio, mi nun ankaŭ parolas la nederlandan. (Mi nur ne devas uzi ĝin tre ofte dum la studo.)

Feliĉe, mi transloĝiĝis al Kolonjo. O, la urbego! Mi lernis dum la unua tago: Aŭti en Kolonjo estas sinmortigo. La pli bona alternativo estas ĈIAM biciklo, aŭ – se vi sentas vin malforta, aŭ simple pluvas – trajno.

Mi nun devas klarigi ion. En psikologio, same kiel en ĉiuj aliaj

sciencoj, ekzistas faka slango. Mi grupigos ekde nun la psikologian slangon kaj la normalan parolmanieron kiel du lingvojn: "la psikologia (lingvo)" – kaj "la nepsikologia (lingvo)".

Ree al bicikloj. Ĉiuj biciklas en Kolonjo. Ĉien. Universitaten. Laboren. Al amikoj. Ĉien. Fakte, eĉ mia profesoro de lerteorio unufoje klarigis la koncepton de "sendkonscio" (unua ekzemplo de la psikologia!) tiel:

En la kapo de naturamanta civitano ekzistas jena ideo: Aŭti malpurigas la naturon. Do: Aŭtistoj estas egoismaj fipersonoj. Kontraŭe al la biciklistoj! Tiuj amindaj personoj tute ne malpurigas ion! Do: Biciklistoj estas pli bonaj homoj ol aŭtistoj – ja kompreneble. Efektive, biciklistoj estas ja pli bonaj homoj ol ĉiuj aliaj, ĉu ne?

Tiom bonaj personoj, fakte, ke eĉ la trafikregularoj tute ne ĝustas por ili. Ili ja ne malpurigas la naturon, kaj la trafikregularoj nur estis inventitaj por puni la fiaŭtistojn.

La koncepto de sendkonscio okazas en la momento, kiam la tipa (al-la-naturo-bonega) biciklisto kolizias al piediranto. Jes ja, la trafikklumo por la biciklisto estis iomete ruĝa. Sed tiu stulta piediranto devus scii, ke biciklistoj bonegas! Diablo vin prenu! La belega biciklo! Ĝoju, se mi ne anoncos vin ĉe la polico! – Kaj la biciklisto veturas foren.

Sed eblas, ke la akuzo fare de sendkonscio de la biciklistoj en Kolonjo estas senkiala. Eblas, ke ili ĉiuj estas simple kolorblindaj. Ĝis la relego!

VIA PASERINO ALICA

kune @esperanto.de

sciencoj, ekzistas faka slango. Mi grupigos ekde nun la psikologian slangon kaj la normalan parolmanieron kiel du lingvojn: "la psikologia (lingvo)" – kaj "la nepsikologia (lingvo)".

Ree al bicikloj. Ĉiuj biciklas en Kolonjo. Ĉien. Universitaten. Laboren. Al amikoj. Ĉien. Fakte, eĉ mia profesoro de lerteorio unufoje klarigis la koncepton de "sendkonscio" (unua ekzemplo de la psikologia!) tiel:

En la kapo de naturamanta civitano ekzistas jena ideo: Aŭti malpurigas la naturon. Do: Aŭtistoj estas egoismaj fipersonoj. Kontraŭe al la biciklistoj! Tiuj amindaj personoj tute ne malpurigas ion! Do: Biciklistoj estas pli bonaj homoj ol aŭtistoj – ja kompreneble. Efektive, biciklistoj estas ja pli bonaj homoj ol ĉiuj aliaj, ĉu ne?

Tiom bonaj personoj, fakte, ke eĉ la trafikregularoj tute ne ĝustas por ili. Ili ja ne malpurigas la naturon, kaj la trafikregularoj nur estis inventitaj por puni la fiaŭtistojn.


La koncepto de sendkonscio okazas en la momento, kiam la tipa (al-la-naturo-bonega) biciklisto kolizias al piediranto. Jes ja, la trafikklumo por la biciklisto estis iomete ruĝa. Sed tiu stulta piediranto devus scii, ke biciklistoj bonegas! Diablo vin prenu! La belega biciklo! Ĝoju, se mi ne anoncos vin ĉe la polico! – Kaj la biciklisto veturas foren.

VIA PASERINO ALICA



kune @esperanto.de

komikso

1/2007-19



Ŝerco unue aperita en skeĉo de Aŭtojedek ĉe IJK, Sarajevo, 2006



Ĉu Esperanto en nacia radio?

Jes, Radio polske! Aŭskultu la esperantlingvan elsendon de la pola radio ĉiun vesperon (ĉ. 18a).

Iru al: www.polskieradio.pl/eo/



Eo en radio

Sed tio ne estas ĉio....


Vizitu la novan GEJ-angulon en la elsendoj de varsovia vento – ekzemple en podkasto 20 vi aŭdos raporton pri la komuna estrarkunsido de GEJ kaj PEJ en Posnano! Malkovru tion kaj multe da aliaj stultaĵoj kaj anguloj sur:

www.viavento.org/

varsovia vento
elsendoj



“ni perdiĝas en deserto”

de Aleksander Galkin, alauda 
gmail.com, foto el blinda gardisto

El kol-ekto de kor-ektisto: amuzaj eraroj, trovintaj dum korektado de tiu ĉi numero.

“baldaŭ tiris lin el la vilaĝeca Sens al Germanio”
(Germanio estas tiom malagrabra por francoj, ke vere oni devas “tiri lin”, por ke tiuj venu)

“provi tipan por la regiono alkoĥolan mielon”

(Do, estas mielo por plenkreskaj homoj. Interese, ĉu abeloj povas esti ebriaj??)
(Kaj alkoĥolo eble estas tiu trinkaĵo, kiun oni ĉiutage trinkis en kolĥozo, ĉu??)

“ni perdiĝas en deserto”

(Ho, nokta koŝmaro – perdiĝi en ŝokolada pudingo kaj ne sukcesi trovi elirvojon)

“esperanta aranĝo” (tre ofta)

(Vere, niaj aranĝoj ĉiam esperas, ke eble ili fariĝas pli popularaj...)

“Ĉi-rilate ne gravas la kvalito aŭ la brando”

(Vere, se la kvalito de brando foje jam ne plu gravas, gravas nur ties kvanto!!)

deserto/GEA



---GEA-EKZAMENO---

Ni ĝoje informas ĉiujn, ke ĉiuj 6 personoj, kiuj anoncis sin por la lingvoekzameno de GEA dum ĉi-jara IS, sukcese trapasis ankaŭ la skriban parton de ĝi! Ili estis: Carolin (Germanio), Duncan (Skotlando), Dennis (Danio), Gong (Ĉinio) kaj Robert W. (Germanio). Duncan kaj Robert meritas apartan aplaŭdon, ĉar ilia fina noto estas 1.

Gratulojn al ĉiuj vi!

Sekvan GEA-lingvoekzamenon ni planas okazigi en Bonn, dum PSI – Paska Semajno Internacia. Detaloj baldaŭ haveblas ĉe la hejmpaĝo de Esperanto-Centro Herzberg: www.ic-herzberg.de informis: Vera (eksa Gufujestrino, nuntempa volontulo en Kormonto), la 6a homo estas Sebastian Hoffmann!! :))

sub_18 war es ein Erfolg??

Was ist nun also das Resumee vom zweiten Sub_18-Treffen in Deutschland? Sind die Organisatoren zufrieden oder gab es lange Gesichter? Ne, gut war's in der Mainstadt. Auch das zweite Sub_18-Treffen war von der Teilnehmerzahl her ein Erfolg.

1/2007-22



Viele der Teilnehmer haben sich nach dem Treffen in Stuttgart vom Sub_18-Fieber anstecken lassen und sich für Frankfurt angemeldet. Die Gruppe war eine klasse Mischung, groß genug um Stimmung aufkommen zu lassen und nicht zu groß, um in der Großstadt verlorenzugehen. Das Programm war verlockend, Leo und seine Kahlgründer haben sich viel Mühe gegeben. Sicher waren die jugendgerechten Programmpunkte mit ein Grund, warum auch viele neue Teilnehmer den Weg nach Frankfurt gewagt haben. Und:.... Sub_18 wurde international. Zwar verstand Matthias aus den Niederlanden auch etwas Deutsch, aber erst mit seinem Esperanto-Niederländisch-Kauderwelsch brachte er Stimmung in die Gruppe. Alles wird anders, Sub_18 Nummer 3 in Bonn wird noch besser... In diesem Sinne, aliĝu kaj venu.

Ig andi



2. Sub_18 Treffen in Frankfurt am Main, 24. - 26. November 2006

Am letzten Novemberwochenende fand in Frankfurt am Main das zweite Sub_18 Treffen statt. Es haben dieses Mal 14 Teilnehmer aus 2 Nationen daran teilgenommen. Die meisten Teilnehmer kamen aus dem Rhein-Main Gebiet. Ein reichhaltiges Programm machte das Wochenende zu einem unvergesslichen Erlebnis für alle Teilnehmer. Es fanden drei Esperantokurse (Anfänger, Fortgeschrittene und fließend Sprecher), eine Stadtbesichtigung, Präsentation der Esperantowelt sowie viele nette Sonderpunkte. Für die Anfänger war dies ein gelungener Anlass, um einmal in die Esperantowelt hereinzuschnuppern.

Das 3. Sub_18 Treffen fand während des PSIs in Bonn vom 30.03.07 - 01.04.07 statt.

KAI:
alle sind gut drauf. es kommt einem so vor, als ob man mit den besten freunden zusammen ist, obwohl man sich gerade erst kennen gelernt hat.

Julia:
